Christian Morgenstern,

# La lupfantomo

*tradukita de Bertilo Wennergren*

Jen lupfantom' de famili'
meznokte iam kuris for
al tombo de la profesor'.
kaj petis pri konjugaci'.

Do diktis tiu dokta ul'
starante sur la kructabul'
dum lup' senmova kiel splinto
atentis vortojn de l' mortinto.

De "lupfantomo", simpla rekta,
tra "lupfintomo", plej perfekta,
plu "lupfontomo", iom rara,
ĝis "lupfuntomo", ho, koŝmara.

Ĉi participoj plaĉis multe
al la fantomo, kaj rezulte
ĝi petis: "Legu plu el PIV-o
pri participoj en pasivo."

La viro ĉagreniĝis tamen:
"Jam fermis mi per fin' kaj amen,
ĉar netransiraj bestoj feblas
kaj la pasiv' neniam eblas."

Sed lupfantomo pri transiro
ja spertas pli ol eĉ vampiro.
La lup' revenis larmokula
al sia famili' ulula.

*Traduko de la Germana poemo "Der Werwolf" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de Bertilo Wennergren.*

*Arg-825-1653 (2013-02-14 23:29:47)*

*Vidu la retejon* `http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html` *.*